



Informoj:  
Arto :- Literaturo  
Turismo :- Sciigoj

# NIA VIVO

Administracio  
kaj Redakeio:  
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

## LA JUĜISTA SEKESTRO

el JOSÉ M.<sup>a</sup> GALÁN

Dediĉita al mia tre kara amiko S-ro Josefo Orós

Alpaŝu, sinjoro juĝist', pli prosksimen,  
Kaj ĉiuj venantoj eniru,  
Ne sentu pro tio premantan doloron,  
Kaj ankaŭ ne kaptu vin timo...  
Se antaŭhieraŭ vi estus venintaj  
Aflikti nur ŝin, ho je Dio!  
Vi estus ĉe pordo de mi mortfrapitaj.  
Sed nun ŝi jam mortis!... La ilojn  
Sekestru, ĉar mono ĉi tie ne estas:  
Elspezis mi lastan centimon  
Por ŝia nutrad' kaj aĉet' de maltrafaj  
Necesaj al ŝi kuraciloj,  
Kaj ĉiuj jen aĵoj, ankoraŭ restantaj  
—Ĉar mankis la temp' por vendiĝo—  
Jam estas sentaŭgaj kaj tre min mallogas.  
Sekestru ĉi tiun sarkilon  
Kun la hakileto, forprenu pendantajn  
Plafon-enpikitajn falĉilojn  
Kaj tiun pioĉon... El iloj ĉi tie  
Mi volas, ke restu nenio!  
Por ki'al mi taŭgus? Se mi vivrimedon  
Al ŝi devus gajni, neniŭ  
La ilojn de mi eĉ perforte forprenus!  
Sed nun mi ne volas sarkilon

Ekvidi, nek la hakileton, nek pende  
Plafon-enpikitajn falĉilojn,  
Nek tiun pioĉon... Sed nun mi vin petas,  
Atentu, sinjoro juĝisto,  
Neniŭ el viaj pedeloj kuraĝu  
Ektuŝi sur tiun ĉi liton,  
En kiu ŝi estis hieraŭ mortinta;  
Liteto de mia feliĉo,  
En kiu mi amis ŝin, kiam ŝi sanis,  
La kara liteto, en kiu  
Flegadis mi ŝin dum malsano kaj kie  
Ŝi kuŝis monatojn kun vivo  
Kaj nur unu nokton, ho ve! jam mortinta!  
Mi petas, sinjoro juĝisto,  
Ke iu ne provu eĉ unu fadenon  
Ektuŝi de tiu ĉi lito,  
Ĉar ĉe via vido mi fulme lin buĉus!  
Forprenu, forprenu ja ĉion,  
Sed ne la liteton, ĉar tiuj littukoj  
Enhavas de ŝi korpoŝviton...  
Kaj ilin flarante, mi flaras l' odoron,  
L' odoron de kara l' edzino!...

El la hispana lingvo, tradukis,  
VICENTE INGLADA.

### PROCENTEGULA KONTRAKTO

EL LA «NEVERŝAJNAJ RAKONTOJ»

DE JOZEFO LÓPEZ RUBIO

La disputo komenciĝis pro tialo tute banala,  
kiu—oni ne scias kial—sukcesis tiel pasiigi ĉiujn.  
La laŭteco pliigis kaj pugnobatoj ofte frapis sur  
la tablon, de granda ĝojtintado de kuleretoj kon-  
traŭ la filharmonia pokalkristalo.

Sinjoro Daniel subtenadis la plejmalon de tio,  
kion la furioziĝinta sinjoro Eulogio defendis.

—Jes! Mi diras al vi.

—Ne! Mi ripetas al vi.

—Ĉe mi estas la plej absoluta evidenteco!  
—Kaj ĉe mi—la plej difinita certeco!  
Versajne, tiel fortikegaj argumentoj senpravigis  
nek unun nek la alian.

Subite, sinjoro Eulogio ekkriis:

—Mi vetas mian kapon por la jesoj!

La tuta ĉeestantaro ektemis.

Nur sinjoro Daniel, iom ironie, respondis:

—Ĉu la kapon? Kial vi ne vetas ion pli valoran?

—Ne, ne! La kapon! Mi diras al vi, ke mi vetas  
mian kapon!

—Ĉu ne estus pli bone veti kelkajn botelojn da  
cidro?

—Ne! Mi vetas mian kapon!



—Bone, bone; tio estu, diris sinjoro Daniel kun maltima trankvileco.

La ĉeestantaro reektremis.

Sinjoro Daniel daŭrigis:

—Bone. Niajn kapojn. Ni interkonsentas. Sed vi devas kompreni ke veto estas seriozajo kaj oni devas ĝin fari laŭ ĉiuj leĝaj kondiĉoj.

—Kion vi volas diri?

—Ĉu mi? Ĝi estas tre facila! Ĉi tiuj sinjoroj subskribos ĉi tie, sur tiu ĉi paperfolieto, ke ili estas atestantoj pri tio; ke sinjoro Eulogio Soldevilla serioze vetis sian kapon kontraŭ la opinio kiun mi defendas. Ĉu ne?

La kapo de sinjoro Eulogio restis vetita kaj tial ke sinjoro Eulogio malgajnis la veton kaj, sekve, kun ĝi la kapon, sinjoro Daniel, kun la paperoj sub la brako, senprokraste aliris lin viziti.

—Mia amiko: vi scias ke mi gajnis la veton.

—Jes, sinjoro.

—Laŭ tio, via kapo apartenas al mi.

—Kiel vi estas ŝercema!

—Ne, ĝi ne estas ŝerco! Mi havas dokumenton, kiu ĝin atestas. Jen ĝi. Tial mi ripetas ke via kapo apartenas al mi.

—Ĉu eble vi celas tratanĉi mian kolon?

—Nu! Ne, mi ne estas tiel idiota. Kion mi gajnus per tio?

—Do, kion vi celas?

—Simpla, efektiviĝi mian posedecan rajton sur ĝin.

—Kiel?

—Diversmaniere. Antaŭ ĉio, vi posten kombos viajn harojn, ekde morgaŭ. Tiu flanka hardislino malplaĉas al mi.

—Vi ne rajtas tion farigi!

—En bienaĵon, kiun mi plenposedas, mi rajtas enigi ĉiujn reformojn ŝajnantajn al mi oportunaj. Ĉu vi komprenas?

—Jes. Ĉu nur estas tio?

Ho, nel! Estas plu. De nun vi estos devigata elpigi al mi dek durojn ĉiumonate kiel luprezon de via kapo.

—Kion?

—Kion vi aŭdas. Plie, ĉar vi estas verkisto, tial mi devas enspezi tridek kvin procentojn el la verkoj produktotaj de via kapo.

—Ho! Tion oni ne povas toleri!

—Priekzamenu. Ĉu vi ne akceptas!

—Kiel mi povus rifuzi?

—Vi estas prudenta viro. Ni daŭrigu. Por fari al vi portreton vi bezonos de mi specialan permeson, escepte se vi dezirus fotografiĝi de la kolo malsupren, en kies okazo mi nenion povus kontraŭstarigi.

—Kion pli?

—Pro la danĝeroj ĉie embuskantaj la urbanojn vi devos deponi de min garantiaĵon, ĉu ne? Kiu

garantias al vi ke morgaŭ kiam vi iras tra strato, iu tegolo ne falas sur vin rompante vian kapon? Mi ne povas forlasi mian proprajon al arbitro de tiaj eventualaĵoj.

—Kaj el kio konsistas tiu garantiaĵo?

—Se vi ne forirus el Madrido, —el ducent pesetoj. Se vi volus ekvojaĝi, la garantimono pliigos kvincent pesetoj.

—Bone, sed la elspezoj por mia kapo, ĉu ili estos el via konto?

—Kompreneble! Tiaj elspezoj ĉiam estas por la bienposedanto.

—Laŭ tio vi devas pagi mian manĝadon. Mi manĝas per la buŝo, kaj la buŝo estas en la kapo.

—Ha! Sed tiu nutraĵo ne iras en la buŝon sed en la stomakon, ĉu ne?

—Jes.

—Do, la buŝo nur estas la vojo. Sekve vi pagos al mi kvin durojn ĉiumonate, laŭ imposto pro transpaso.

—Kaj kio okazus se mi ne pagus ilin?

—Vi devus nutri vin per injektajoj.

—Mi, do, preferas pagi la transiran imposton. Ĉu nenion plu?

—Nune, nenion plu. Vi estas tuj efektivigonta la pagon da: ducent pesetoj plus kvindek plus dudek kvin plus... Kiomaj estas viaj enspezoj?

—Mi havas, el ĵurnalo, monatsalajron po sesdek duroj.

—Ĉu sesdek duroj? Sesdek duroj estas tricent pesetoj. La tridek kvina procento el ili estas cent kvin pesetoj, kiuj, kun la antaŭaj, sumigas tuton je tricent okdek pesetoj, kiujn vi tuj pagos.

Sinjoro Daniel enspezis sian monon kaj, frontante al si la manojn, gratulis sin unu — kaj milfoje pro la sukceso de tiu fruktodona veto. Ĝuste en tiu semajno lia luinto adresis al li la sekvantajn liniojn:

Kara S-ro: Laŭ interkonsentite, tio estas, ke la elspezoj farotaj por la ornamo kaj konservado de la kapo estos pagataj de la posedanto, mi plezure sendas al vi la ĉi-suban fakturon:

Pro abono en la barbirejon kun harfrizigo, kaplavado, violparfumado, harpinta bruligado kaj vizaĝa masaĝo . . . . .	130	Pesetoj.
Valoro de la fakturo de la dentisto S-ro Cejuela pro buŝpurigo, enpastigo en du mueldentojn kaj anstataŭigo de tri per sama nombro de aliaj el bonkvalita ora . . . . .	822'50	»
Pro griza kastorĉapelo, alia el nigra felto kaj ĉapo el maldika kaj delikata lano . . . . .	135	»
Pro marŝaŭma pipo . . . . .	75	»
Pro funto da angla tabako. . . . .	10'50	»



Pro tubo da dentpuriga pasto. . . . .	3	Pesetoj.
Pro dentbroseto . . . . .	1'25	»
Pro nazumoj kun ora kunigilo kaj konkara rando . . . . .	42	»

LA TUTO . . . . . 1.219'25 »

Sinjoro Daniel ĵus leginte ĉi tion, subite paliĝis kaj akiris nesanigeblan heptamalsanon.

—Mia amiko: mi venas vendi al vi vian kapon. La rezulto estas ke ĝi elspezigas monon de mi, anstataŭ ĝin produkti...

—Kian prezon vi proponas al mi por ĝin akiri?

—Tre malkaran. Kvincent pesetojn.

—Mi kredas ĝin tro granda!

—Estas nekredinde ke vi havas por via kapo tiel malgrandan ŝatecon, sinjoro! Neniam mi vidis pli grandan malaliĝemon.

—Kion vi volas! Jaroj igis min terure egoista kaj, iom post iom, forprenis de mi la iluziojn. Mi nur donas kvindek durojn por mia kapo.

—Ĉu vi ne plialtigas la prezon ĝis tricent pesetoj?

—Ne. Mi estas certa pri ĝia neplua valoro.

—Bone, tiu estu. Paciencon! Ĉiel, tio estis malgajniga negoco...

El la hispana lingvo, tradukis

RICARDO MORENO

DE LA

RONDETO «LA KVARO».

## ESPERANTUJO EN CEUTA

### ...kaj vespere, mi alvenos

Kiam la ŝipo atingis la havenon, mi supozis, ke baldaŭ, mi vidos iun samideanon, kaj certe, post kelkaj minutoj, mi estis salutata de samideano kiu zorgis pri mi, pri miaj pakajoj, pri mia veturilo, pri mia loĝejo, ktp.

Je mia honoro, flirtis nia verda flago ĉe la balkono de la ejo al kiu, de tiam mem, mi apartenas.

Ĉu mi diras iun novan? Mi kredas ke ne. Sed mi estas devigata paroli—aŭ pli bone skribi—pri tiuj samideanoj kiuj, nun, ekaperas ĉe nia movado, kaj jam sentas nian bonan internan ideon.

\*\*\*

Iam, laboristo, estis demandata de fremda turisto. Ĉu vi konas Esperanton? Kaj li kredis ke Esperanto estas iu persono aŭ aĵo. Tamen li serĉis tian vorton kaj legis ion pri nia ideo. Li parolis kun iuj kamaradoj kaj decidis, tute solaj, lerni Esperanton.

Poste li konis Sinjoron Vargas, kiu jam bruis iom en alia urbo—kaj kiu estas la nuna profesoro—kaj ĉiuj aranĝis la unuan kurson, luis ĉambron, formis la grupon «Verda Stelo» kaj eĉ sukcesis aranĝi alian grupon en proksima loko.

Mi ne deziras kolerigi la Sekretarion, sed mi devas paroli iomete pri li.

Kial la ejo estis ornamita kaj meblita sen elspezi? Tuj kiam vi faros tian demandon, ekaperos la Sekretario. Li ordonas; ĉiuj obeas lin; kaj iuj malnovaj lignaĵoj, iuj sakoj kaj iom da pajlo, kovritaj per donacitaj ŝtofoj, faras du belajn kanapojn.

Dum la vesperoj, oni ordonas kaj laboras. Ĉiutage aperas nova meblo aŭ ornamajon. Kaj li daŭrigas skribi aŭ aranĝi novajn aferojn.

\*\*\*

Daŭrigu senĉese nian laboradon por ke ĉie floru nia semo.

JIMÉNEZ MORA.

## MALNOVAJ PĀĜOJ

FABLOJ

DE JOSEFO WASNIEWSKI

### I.—SINJORO KAJ ARBARISTO

Reveninte unu fojon el arbaro, unu sinjoro malbenadis antaŭ arbaristo, ke iradante tie, li ne aŭdis eĥon. «Cu vi donadis signaldirojn?» demandas la arbaristo. — «Ne, mi iradis silentante». — «Kion do vi volas de la arbaro?»

### 2.—INFANO KAJ PATRO

Estis somero, kiam la infano diris al la patro: «Mia patreto, ĉu vi aŭdas, kiel ĉiutage vespere tie de la bordo de trans la lago alfluadas al mi ia kanto, kvazaŭ akordoj de muziko... Ĉu tion kantas la najtingaloj?» — «Ne, fileto» — respondis la patro — «kvankam tio ĉi estas kantaj horoj, sed memoru en la daŭro de via tuta vivo, ke el koto vi, fileto, aŭdos ĉiam nur ranojn...»

### 3.—KOLONO KAJ KANO

Starante apud lageto, kolono demandis unu fojon la kano: «Kial ĝis nun vi ĉiam alklinadis vin al mi, dum hodiaŭ vi fleksis vian kapon de mi al flanko tute kontraŭa?» La kano respondis modeste: «Ha, ne vidu en tio ĉi iajn malsaĝajn pretendojn de mia flanko... Tio ĉi estas la ordinara historio de kano. Mi volus ĉiam al vi flexi mian kapon, sed hodiaŭ la vento blovas al alia flanko».

### 4.—AZENO KAJ ŜAFOJ

Sur la kampo mordetante la herbon apud la vojo, azeno demandis la transirantajn ŝafojn: «Kien vi tiel amase tra tie ĉi iras? Kia celo kondukas vin? ĉu vi iras solaj? Diru, se via celo estas bela, mi iros ankaŭ kune kun vi!» — «Kara azeno», respondis la ŝafo, iranta antaŭe, «ni ne estas sci-



vola, demandu tiun, kiu iras tie post ni kun vipo... Kaj pluen iris la amaso per la vojo inter la kampoj, kaj la azeno, skuante la orelojn, aldiretis: «Ŝafoj!...»

### 5.—VENTO

Antaŭ nelonge en interesa priskribo mi trovis, ke iam la vento laŭ sia malsaĝa volo decidis transstarigi la diversajn objektojn sur la tero. Ĝi blovegis sekve super kampo, super arbaro, super rivero kaj, flugante larĝe malproksimen, kunprenadis ĉion, kion ĝi renkontis, per siaj flugiloj... Havante fervoron superordinaran, ĝi prenis kaj forportis ĉion, kion ĝi kaptis... Dume ĝi laciĝis kaj haltas kaj rigardas ĉirkaŭ si; kaj ĝi vidas, ke kvankam ĝi blovis per sia tuta forto, sur la mondo ŝanĝiĝis nenio... Ĉio staras tie, kie ĝi staris antaŭe, kaj laŭ la direkto de la vento flugis nur la balaaĵoj...

(Eltirita el «Esperantisto», n-ro 48, decembro 1893).

## ANEKDOTOJ

### ELPENSITA LINGVO

La plejmulto el la instruistoj de la juna Benĥameno Konstant' malsukcesis pro la malobeemo de ilia lernanto. Tamen, unu el ili prosperis lernigi al li ion. «Li proponis al mi, diras li, ke ni kreu por ni ambaŭ unu lingvon, kiu nur estus de ni konita». Tiu propono ekflamigis la imagon de la juna Benĥameno Konstant'. Oni tuj eklaboras kaj komencas per elpenso de alfabeto. Post la literoj oni enpaŝis la vortaron. Kia ĉarmo klasigi tiujn ĉi memelpensitajn vortojn laŭ gramatikaj leĝoj! Baldaŭ la lingvo *por du*, la nekonita lingvo troviĝis kompleta, riĉa, kolora, plena je grandeco, elbrilo kaj gracio, kiuj paligis ĉiujn ordinarajn lingvojn.

Tiu lingvo estis la greka.

Laŭ esprimo de S-ro Benĥameno Konstant' mem, lia instruisto estis sukcesinta lin instrui pri la greka lingvo, igante lin ĝin *elpensi*.

(*Hipp. Castille, Nuntempaj portretoj*).

\*\*\*

En la tempo kiam en la kortego kaj vilaĝoj oni plej varme atakis aŭ defendis la konduton de niaj ŝiparestroj, kaj dume oni bedaŭris, ke iliaj klopodoj estas tute vanaj, S-ro de Maurepas, pli juna ol ni, moke parolis pri tiuj gravaj aferoj, kiuj prezentis al li okazon por multenombraj vortludoj.

«Ĉu vi scias, diris li, kio estas surmara batalo? Mi tuj raportos al vi. Du militsiparoj deiras el du kontraŭaj havenoj; ili manovradas kaj poste renkontiĝas; oni pafadas ambaŭflanke, kelkaj mastoj defaliĝas kaj kelkaj veloj disŝiriĝas: oni mortigas homojn kaj malŝparas kuglegojn kaj pulvon;

poste, la du mararmeoj foriras kaj ĉiu el ili pretendas samtempe, ke ĝi restis mastro de la batalo kaj venkis la alian: oni kantas ambaŭflanke *Te Deum*, kaj dume la maro ne fariĝas malpli sala, ol antaŭe».

(*Comte de Ségur, Memorskriboj*).

\*\*\*

Post ŝippereo, kelkaj homoj, kiuj per naĝado eltiris sin el mortdanĝero, alpaŝis en insulon ŝajne senhoman. Kiam ili estis longe marsintaj sur ĝi, unu el ili, elevidinte pendigiton, ekriis: «Ho! dank'al la ĉielo, jen ni staras en civilizita lando».

(*Elekto de anekdotoj*).

\*\*\*

Sekve de tre animita interparolo kun Napoleono I, fraŭlino G. W., glora aktorino, petis lin pri lia portreto. «Jen ĝi estas» ekriis la imperiestro eltirante ormoneron el sia poŝo.

\*\*\*

Kiam Sokrato sin preparis eltrinki la cikutvenenon, Apolodoro prezentis al li multekostan mantelon, en la celo, ke li surmetu ĝin antaŭ ol morti. Sokrato rifuzis dirante: «Nul mia mantelo taŭgis al mi por vivi, kial ĝi ne taŭgos nun por morti?»

\*\*\*

Kuracisto Chirac aŭdante paroli pri la reviviĝo de Lazaro diris: «Se li estus mortinta laŭ mia arto...»

\*\*\*

Oni iam demandis Fontenelle' on, kiamaniere li agis por havi tiel multajn amikojn kaj nenian malamikon. «Mi uzis ĉiam por tio du aksiomojn: ĉio estas ebla kaj ĉiu estas prava», respondis la sprita verkisto.

\*\*\*

La franca astronomiisto Bailly, mortkondamnita de la revolucia tribunalo, diris al la ekzekutisto, kiu demandis lin, ĉu li havas timon: «Ne, mi sentas malvarmon».

Eksterordinara kunveno de delegitoj de la Hispana Esperantista Konfederacio kaj Aragona Federacio

Sro Prezidanto de Aragona Esperantista Federacio kaj Prezidanto de la Konfederacio kunvokas, per tiu ĉi alvoko, eksterordinaran kunvenon de Delegitoj por elmontri, por ke ĉiuj ĝin juĝu, lian agadon kiel Prezidanto, en la afero pri kreo de Supera Interrilata Komitato.

Por ke la Kanaria Esperantista Federacio povu ofidconi Delegiton la kunsido okazos la 15<sup>an</sup> junio je 6.<sup>a</sup> horo vespere ĉe la socia ejo Roda, 14-16.